Révfülöp, 2019

Jeĥezkel 33:10-16
Hebreoj 11: 1-9
Luko 12: 32-48

Karaj gefratoj,

La ligo inter ĉi tiuj du tekstoj ne estas unuavide evidenta. Kie do estas menciita la fido en la teksto de la evangelio? Kaj tamen, multfoje en ĝi troviĝas la ideo de konfido. Kaj fido vere proksimas al konfido.

La teksto de la epistolo al la Hebreoj estas konata. "Per la fido ktp..." kaj la aŭtoro mencias tutan serion de personoj el la Hebrea Biblio, nia Malnova Testamento, herooj de la fido de Izraelo. Kaj ĉi tiuj personoj, patriarkoj, profetoj, estas cititaj kiel ekzemploj.

Nu, ŝajnas al mi, ke tiu peco el la teksto de Luko donas al ni kelkan ŝlosilojn por kompreni tion, kio povas esti, kio devas esti, vivo de fido, de tiu fido, kiu vivigis tiujn glorajn antaŭulojn.

Se ni zorge atentas ĉi tiujn du tekstojn, ni vidas la klaran opozicion faritan inter timemo, timo unuflanke kaj fido, konfido, aliflanke. La antikvaj patriarkoj laŭ la priskribo de la aŭtoro de la epistolo al la Hebreoj sendube havis neniun timemon, neniun timon. Ili antaŭeniris, al la nekonateco, al la promeso, al la espero. Estas iel kvazaŭ la volo esti certa pri la estonteco mortigas la esperon, disigas de la fido.

Kaj ĉi tiuj kelkaj versikloj de Luko ne diras ion alian. La vorto, kiun Dio liveris, valoras pli ol ĉia materia certeco, ol ĉia certigita protekto ; sed ĉio ĉi tio, sen iu ajn alia garantio ol ĉi tiu donita vorto.

Estas neniu kialo timi, plaĉis al la Patro doni al vi la Regnon. Vi povas kredi lian vorton, aŭ ne kredi ĝin. Vi povas havi tre malprecizan ideon pri kio ekzakte temas la Regno, pri kiu li parolas, aŭ vi povas havi pli precizan ideon ; sed estas neniu certeco krom tiu ĉi donita vorto. Ĉiuokaze ĉi tiu Regno valoras pli ol ĉiuj surteraj posedaĵoj, materiaj, ol ĉi tiuj posedaĵoj, sur kiuj ni apogas nin por permesi al ni vivi, por daŭre vivi. Nu, li diras al ni, ke ni faras krudan eraran kalkulon. Al kio ĉi ĉio helpos al ni finfine, kiam nia vivo estos ĉe la fino? Nenio.

Kie estas via trezoro, tie estas via koro. Bone konata biblia sentenco. Iuj eĉ kantis ĝin. Ni pripensu. Kiel utilas trezoro, se ne por prepari al si estontecon, aŭ estontecon por la siaj? Nu, kiel pri tiu, kiu volis konstrui al si pli grandajn grenejojn, Jesuo diris, ke tio estas senutila. Ĉiamaniere neniu regas la daŭrigon de sia vivo. Do lasu ĝin en la manojn de tiu, kiu amis nin ĝis doni sian vivon, en la manojn de tiu, kiu promesis al ni la Regnon, kiu donis al ni la Regnon.

Atentu, mi ne diras, ke estas senutile esti singarda, esti saĝa, esti prudenta. Jesuo ankaŭ havas kelkajn parabolojn pri tio. Simple, ni ne devas konstrui nian tutan vivon sur tio, fari el ĝi la bazon de la ekzisto. Nia garantio, nia certeco, nia espero estas en Dio. De li ni ricevas la rimedojn por daŭrigi, se ni akceptas, ke ni ricevas ilin de li. Kaj se ni ricevas ilin de li, tio estas ankaŭ por uzi ilin por lia servo. El tio, ĉi tiuj paraboloj de la sklavo kaj la forestanta mastro.

La obeo al la forestanta mastro estas unue obeo ne vidata, ne videbla, ne rimarkenda. Tio estas obeo en fido kaj espero.

La patriarkoj, kiam ili obeis, kiam ili foriris, kiam ili ekiris, ne sciis kien iri, ne sciis, kion ili trovos ĉe la fino, sed ili faris tion, kion Dio atendis de ili, ne por esti vidataj, ne por esti laŭdataj, sed nur per fido; kun ĉi tiu certeco, ke la vorto de ĉi tiu Dio vokis ilin, kaj diskrete akompanis ilin, ke ĉi tiu vorto estas fidinda, sen alia pruvo ol ĉi tiu interna konvinkiĝo.

Se ni diras, ke Dio akompanas nin, ke Kristo vivas en ĉiu el ni, kiel Paŭlo diras, ke ni estas ĉiu la templo de la Sankta Spirito, ni ne havas alian pruvon ol ĉi tiu interna konvinkiĝo, ol ĉi tiu certeco enradikiĝinta en nia plej profundaĵo, mallonge dirite ol ĉi tiu fido, kiu loĝas en ni.

En la parabolo de la saĝa administranto, ni komprenas, ke ĉi tiu homo tre bone povus agi, kiel li volus, pensante pri sia propra profito ĉar la mastro estis for. Sed jen, se li estas fidinda, la mastro scias, ke tiu agos precize kvazaŭ li mem estus ankoraŭ tie, ke lia foresto ne faras diferencon.

La Regno ankaŭ estas respondeco, kiun la Sinjoro lasas al ni. Nia mondo, la homoj ĉirkaŭ ni, kaj la aliaj malproksime, estas parto de la ŝarĝo transdonita al la Eklezio kaj al la kredantoj. Dio ne estas videbla, almenaŭ dum liaj infanoj ne videbligas lin. Kia estas nia fido? Kion ni ricevis? Ĉu ni ricevis nur por ni mem, aŭ ĉu ni ricevis por redoni, por doni, por doni vivon kaj konsiston al la Regno, al ĉi tiu Regno, kiun Li donis al ni, pri kiu li donis al ni la respondecon, la ŝarĝon?

Nia fido estas la atesto de aferoj nevideblaj, la realo de tio, kion ni esperas, kie ni metas nian trezoron, ĝi estas la sola sekura investo. Kaj nia fido ne estas nur por ni. Ĝi montras al ni, ke tio, kion ni ricevis por kelka tempo, estas tio, kion ni devas dividi, redoni, obeante, servante, kaj per tio ni trovos trezoron aliloke, trezoron en la ĉielo, trezoron, kiun nenio povas forpreni de ni. Kaj vi bone scias, ke kion ni donas, neniu plu povas forpreni ĝin de ni.

Nia fido, nia konfido, ne povas esti metita en aferojn kiuj pasas, kiuj povas malaperi, en aferoj, kiujn ni devos folasi iam. Nia fido, nia espero estas aliloke, en ĉi tiu amo, kiun Kristo montris al ni, en ĉi tiu amo, kiun li invitas al ni dividi, en ĉi tiu amo, kiu neniam povas esti forprenita de ni, en ĉi tiu amo, kiu portos nin eĉ preter nia ekzisto, kiun ni portos eĉ preter nia ekzisto. Ĉi tiu servo, ĉi tiu Regno kiun ni estos vivintaj, en obeado kaj fido, en espero kaj amo, ĝi ankaŭ akompanos nin por ĉiam.

La peco de Jeĥezkel, kiu estis legata pli frue, ne diras ion alian. Se la virtulo, kiu elektis justan vivon, ekfalas, eraras pri la trezoro, la fido, la espero, tiam li estos kiel iu, kiu ĉiam vivis en peko. Aliflanke, se iu, kiu, post eraro pri peko kaj maljusteco, ekelektas justecon, fidon, obeon, tiam li estos kiel iu, kiu elektis por ĉiam fidon, vivon, justecon. Li vivos. Dio ne atendas de ni perfektan vivon. Li proponas al ni sian justecon, li volas doni al ni sian justecon, kiel nova vesto. Ni devas ekpreni ĝin kun fido. Dio rememorigas nin, ke lia deziro ne estas la morto de la malbonulo, sed ke tiu revenu el sia malbona vojo kaj vivu.

Tiu, kiu komprenas tion, kion Dio atendas de Li, kiu havas la internan konvinkon pri tio, sed kiu ne faras tion, kion Dio esperas, ĉi tiu eraris pri trezoro. Li havis la eblecon de la trezoro de Dio, sed li preferis la pereeblan trezoron, kiu estis ŝtelebla, portempa, kaj ankaŭ vidos lian

vivon preni la direkton al puno, al senrimeda perdo. Do tiu, kiu ricevis multon, estu ankaŭ tiu, kiu donas multon, ĉar li ankaŭ estas tiu, al kiu oni multe petas.

Kie estas via trezoro, tie ankaŭ estas via koro. En kiun trezoron vi metas vian konfidon, vian fidon? Ĉu ankoraŭ en trezoro kiu fuĝas inter la fingroj kaj kiu garantias nenion, kaj kiu povas konduki al morto, kiu kondukas al nenieco? Aŭ ĉu vi preferas ĉi tiun neelĉerpeblan trezoron, kiu neniam povas esti prenita de vi kaj el kiu vi povas konstante tiri por redoni, servi, iri antaŭen, porti ĉi tiun Regnon donitan al vi?

Do, pretiĝu, kun zono ĉe la lumboj kaj kun lumantaj lumoj.

Amen